# Informilo

Monata revuo - Maandelijks tijdschrift - 10a j. n-ro 7, okt. 1990

## Estraro

*Prezidanto:* Monique Caestecker, Kerkstraat 66, 9940 Sleidinge. Tlf. (091) 57 63 84.

*Sekretario:* Ivo Durwael, Paul Gilsonlaan 5, 2650 Edegem. Tlf. (03) 440 30 92.

*Financoj:* Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, 8000 Brugge. Tlf. (050) 33 00 04.

*Instruado:* Alex Humet, Campenhoutstraat 4, 2600 Berchem. Tlf. (03) 239 21 69.

*Eksteraj rilatoj:* Jos Vandebergh, Ambachtstraat 39, 3530 Houthalen. Tlf. (011) 52 19 43.

## Komisiitoj

*Financoj:* Roland Rotsaert, Ivo Durwael kaj Paul Peeraerts.

*Eldona agado:* Chris Declerck, Gerrit Berveling, Rejna de Jong, Alex Humet kaj Paul Peeraerts.

*Manlibro de la aktivulo:* Marc Vanden Bempt, Duisburgsestraat 12, 3001 Heverlee. Tlf. (016) 20 14 53.

*Gazetara servo:* Guido Van Damme, p/a FEL, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen. Tlf. (03) 234 34 00.

*Rebata servo:* Germain Pirlot, Steenbakkersstraat 21, 8400 Oostende. Tlf. (059) 70 87 00.

*Prelegvojaĝoj:* Hilde Van Ingelgem, Arbeidsstraat 21, 9300 Aalst. Tlf. (053) 70 50 11.

# FEL-estraro: protokolo

13a de oktobro 1990

Ĉeestas: Ivo Durwael, Roland Rotsaert, Paul Peeraerts, Jos Vandebergh, Alex Humet, Marc Vanden Bempt.

## 1 Financa raporto

### 1.1 Spezokonto

La prognozoj ne estas brilaj. Pro tio ke la lastaj monatoj de la jaro kutime estas pli favoraj ol la mezaj, tamen restas espero. La vendo de nepropraj libroj kreskis tre kontentige.

### 1.2 Anoncoj en *Esperanto-Panorama*

Difinita libroservo en Wilrijk petis la aperigon de du anoncoj en *Esperanto-Panorama*: unu pri tiu libroservo kaj unu anonco pri *El popola Ĉinio*. Konsiderante ke FEL mem estras libroservon kaj ke FEL estas peranto por *El popola Ĉinio* en Belgio, la estraro decidas ne akcepti la du anoncojn. ID skribos pri tio.

### 1.3 Investoj

Sekve al la peto de la estraro, PP faris liston de eblaj estontaj investoj. En ĝi troviĝas: novaj seĝoj por la personoj kiuj faras sidantan laboron (52000 BEF) - aersuĉilo por la presejo (30000 BEF) - Bacher-kontrolo por la presmaŝino (? BEF) - Memoro por la komputilo de la kompostisto (10000 BEF) - 2 aŭ 3 modemoj (20000 - 30000 BEF). La estraro petas al





PP esplori ĉu eblas akiri finseriajn seĝojn aŭ simile, je reduktita prezo. Se jes, li tuj aĉetu. La aliaj eroj atendu ĝis 1991.

### 1.4 Eldona agado

- La verko *Urd Hadda murdita* estas nun kontrolata de Rejna de Jong. Ricevinte ŝiajn korektojn, ni eldonu kiel eble plej baldaŭ.
- Kompostataj estas nun du poemaroj, unu de Emile Van Damme kaj unu de Christian Declerck. Ambaŭ aperos en la Stafeto-serio.
- Finkompostata estas *La Fundamento sub lupeo*, kompostota restas *Renardo la Vulpo*.
- Ni daŭre atendas por la historia libro la antaŭparolon de Claude Gacond.
- Montriĝas ke inter la libroj eldonitaj de FEL inter 1982 kaj 1988, nur tri iĝis deficitaj *(Kazinski, Nigra magio* kaj *Vojaĝoj finiĝas)*. La aliaj redonis la investitan kapitalon.

### 1.5 Perpoŝtaj vendoj

La perpoŝta kampanjo inter 1000 anoj de la nederlandlingva sekcio de Movado sen Nomo ricevis eĥon de nur 0,4 %; tiu inter iamaj informpetintoj de FEL tamen 4 %. Perpoŝta kampanjo por Monato donis pozitivan rezulton de 25 % en Nederlando kaj de 5 % en Francio[1]. Kampanjo en Britio estas okazanta nun. Kampanjo pri la *Verda Konto* inter kuracistoj de la "riĉaj landoj" donis nenian rezulton.

## 2 Agadplano

### 2.1 Varbado

En 1991 oni denove faros kampanjon inter la studentoj, sed ne nur en Antverpeno (kiel en 1990) sed naciskale.

[1] La kampanjo en Francio fakte ankoraŭ daŭras. La cifero estos do pli alta.

Esperanto 2000 proponas alternativon apud nia nuna "incitilo", la faldfolio Eo I: skatolo el kiu eblas preni kartojn. La centro ellaboru ion antaŭ aŭgusto 1991.

La centro havigu al la grupoj la Esperanto-simbolon en diversaj formatoj, taŭgaj por nigra-blanka presado.

Ĉiu serĉu adresarojn de instruistoj, studentoj, lingvistoj por nia perpoŝta kampanjo.

### 2.2 Renovigo de la agadplano

Pieter kaj MVB ellaboru ĝis februaro 1991 novan agadplanon surbaze de la principoj de merkatado.

### 2.3 Financa apogo

PP serĉu.

### 2.4 Novaj grafikaj laboroj

Grupoj de FEL kiuj povas akiri novajn klientojn por la Grafika Centro ricevos ekde nun kompenson en formo de senpagaj informiloj, senpaga leterpapero, libroj ktp. Grupoj kiuj konas eventualan klienton bv. telefoni Paul Peeraerts aŭ Gerd Jacques, tlf. (03) 234 34 00.

### 2.5 Nova koresponda kurso

FEL nuligas sian iaman decidon reverki la nun uzatan korespondan kurson sed provos eldoni novan surbaze de la materialo de Keefe. AH kontaktos kun Keefe pri aŭror-rajtoj k.s. estraro.

Kurson de Keefe por klasa instruado AH nun enkomputiligas kaj FEL provos eldoni venontjare.

### 2.6 Pristudo de investoj

okazu en marto 91 post finiĝo de la financa jaro 1990.

### 2.7 Pristudo de efikeco de kampanjoj

PP faru konstante.



### 2.8 Pristudo de membrar-strukturo

La centro faru konstante.

## 3 Venontaj okazaĵoj

Philippe Van Damme nun kompilas liston de ĉiuj Esperanto-aranĝoj en Belgio kaj ĉirkaŭaĵo. Jen tiu de la venontaj monatoj:

901102-901104 BASF (JEVA+FLEJA semajnfino)
901207-901209 Kultura semajnfino de Sarlanda E-ligo
901227-910103 Internacia seminario de GEJ
910201-910203 Intence valskiadi en Heusy
910302-000000 Semajno de Internacia amikeco en Oostende

**LABORPLANO DE FEL (oktobro 90)**

| Prioritato ↓ | Persono | Dato | Priskribo |
|---|---|---|---|
| 0 | | | aktivigi libroservon: |
| | ĉiuj | | klubo ricevas 10% de vendocifero se ili |
| | | | mem organizas la vendon; |
| | PP | | reklami ke ni vendas ĉion; |
| | | okt 90 | esplori ĉu eblas sendigi mendon de malofta |
| | | | libro rekte de UEA; |
| | | | perkoresponda varbado por novaj libroj |
| 0 | JP | okt 90 | depono lernolibrojn en librobutikoj/kontrolo |
| 0 | RR/PP/MC/ID | | sistema kontrolo buĝeto/rezulto |
| | PP | | eldiskuto ev. kun oficistoj de solvoj |
| 0 | HF/GVD/PP | | pliallogigo Monato, precipe titolpaĝo |
| 0 | PP | | varbado por Monato, per letero, kun |
| | | | rabatprezoj por novabonantoj + instruistoj |
| | | | sendi troajn n-rojn al nepagipovaj landoj |
| 0 | PP | | tantiemon por alporti novajn klientojn |
| 0 | ID | | kontakti aliajn asociojn por graf. laboroj |
| 0 | AH | | atenti pri la efektivigo de la decidoj pri |
| | | | instruado (feb 89) |
| | | | enketado pri la kursoj |
| 0 | MC | | sliparo pri ĉiuj decidoj de estraro kaj kom. |
| 0 | PP | | pristudi la efikecon de niaj kampanjoj |
| 1 | PP | okt | listigi eblajn novajn investojn |
| 1 | centro | sept 91 | kampanjo Horizon-taal por varbi en studentaj |
| | | | medioj en pluraj urboj |
| 1 | PV | sep 90⇒91 | perletera varbado por E' Progr (ĉiumonate) |
| 1 | PV | sep 91 | sistema pendigo de skatoletoj + faldfolioj |
| | | | en publikaj lokoj por varbi |
| 1 | PV+MVdB | feb 91 | ellabori planon por apliki la principojn de |
| | | | merkatado en FEL |
| 2 | PP+PV | sep 91 | serĉi financan apogon por supraj kampanjoj |
| 2 | PP+RR | mar 91 | pristudi eblajn investojn |
| 2 | AH | jun 91 | finpretigo de la materialo de Dennis Keefe |
| 2 | AH | 92 | ĝia adapto kiel porkoresponda kurso |
| 3 | AH | 92 | eldono de la kurso de Keefe |

(0 = konstanta; 1 = jam komencita aŭ tuj komencota; 2 = ne eblas tuj efektivigi; 3 = se la cirkonstancoj permesas tion).

## PROTOKOLO PRI LA ĜENERALA KUNVENO DE FEL 13/10/1990

Komenciĝo: 15.45
Finiĝo: 17.00
Ĉeestis: 20 personoj, kiuj reprezentis la klubojn el Antwerpen, Brugge, Halle, Kalmthout, Kortrijk, Leuven, Limburg kaj Oostende.

1. EŬROPA MANPREMO
   Wylleman informas ke lia klubo preskaŭ senpene akiris 180 kartojn. Nur Gent partoprenis en la kampanjo. La celo estas formi premgrupon.
   Maertens klarigas ke la subskribo de asocioj plej gravas kaj ke necesas interkonsiliĝo kun EEU (kp proponoj Martinetto).
2. TAGO DE INTERNACIA AMIKECO
   Ĝi okazos sabaton, la 2an de marto 1991 en Oostende. La Konko dissendis provizoran programon al kluboj en Flandrio kaj en la marbordo regiono. La programo antaŭvidas antaŭtagmeze akcepton en la urbdomo kaj prelegojn de elstaraj esperantisto kaj neesperantisto (eble Van de Meulebroucke - Eŭropa parlamentano). En la posttagmezo oni antaŭvidas viziton al Oostende kaj ludon por trovi Esperanto-frazojn per kombino de Esperanto-vortoj, kiuj kaŝiĝas en diversaj montrofenestroj.
   De Smet substrekas, ke la aranĝo estas nur senchava se partoprenas eksterlandanoj.
3. ADRESLISTOJ DE ALIAJ ASOCIOJ
   En nia centro oni nuntempe regule organizas perkorespondajn varbkampanjojn. La ĉefa problemo estas trovi bonajn adreslistojn. Ju pli bone definita celgrupo (laŭ aĝo, profesio, hobio ktp) despli granda estos la rezulto. Adreslistoj de lernejanoj, membroj de aliaj asocioj ktp estas ege bonvenaj.
4. ESPERANTO-PANORAMA (EP)
   La ĉefa punkto en la tagordo estis debato pri la aspekto de EP kaj pri la senpaga abono por informpetintoj.
   Van de Bergh montras diversajn ekzemplojn de multe pli belaj ĝis luksaj revuoj de aliaj asocioj, kiuj petas la saman kotizon kiel FEL.
   Lia konkludo: la nuna aspekto de EP malpropagandas.
   Humet supozas ke informpetintoj ne legas ĝin pro la monotona aspekto.
   Peeraerts proponas nuligi la senpagajn abonojn kaj uzi la ŝparitan monon por luksa numero.
   Van Damme certas ke la luksaj revuoj estas luksaj pro la reklamrikolto, kio ĝis nun ne sukcesis por EP. Li ripetas antaŭan peton por uzi unu plian koloron.
   Durwael proponas grandkvante prepari unu luksan numeron kun ĝeneralaj informoj + aldonebla folio pri la aktualaj kursoj por ĉiea informado, kiun oni ankaŭ sendu ĉiujare al iamaj informpetintoj.
   Maertens opinias ke speciala numero aperu en la serio de EP (do samformate, simila aspekte).
   Rotsaert pledas por transiro al A4 formato.
   Van Damme opinias ke la malgranda nombro da paĝoj (10) ne pravigas tion.
   De Smet kaj Van de Bergh malkonsilas la uzon de reuzparero.
   Wylleman montras ke la revueto de Oostende jam rikoltis 7 reklamojn. Kial EP ne?
   Jacques kaj Vanden Bempt atentigas ke reklamoj de lokaj vendistoj pli facile akireblas por lokaj revuoj. Ankaŭ la prezdiferenco de anoncoj estas granda inter loka revuo kaj EP.
   Symoens atentigas, ke la enhavo ne ŝanĝiĝu: ĝi restas ekster la kritikoj de la debatintoj.
   Vanden Bempt proponas kompromison: eldonon de 3 n-roj de EP kun kolora kovrilpaĝo.
   Durwael proponas kalkuli la financajn konsekvencojn de ĉiuj faritaj proponoj kaj fari decidon nur dum la jarkunsido.

Humet proponas (pertelefonan) enketadon pri la interesiĝo por EP ĉe reprezenta grupo de ricevintoj:
Maertens kontraŭas la proponon de Durwael kaj pledas por tuja plibonigo de EP.
Wylleman proponas enmeti respondkarton ĉe la senpagaj abonoj por plie ricevi ĝin. Pluraj debatintoj ne fidas je la efiko.
Van Damme ne volas apliki ŝanĝojn meze de jarkolekto. Do decidoj efektiviĝu en januaro.
FINE LA ĈEESTANTOJ UNUANIME DECIDIS LA JENON:
-INFORMPETINTOJ RICEVOS NUR 3 N-ROJN SENPAGE
-EKDE JANUARO LA ASPEKTO DE EP ESTU PLI ALLOGA, I.A. PER LA UZO DE 2 KOLOROJ POR LA TITOLPAĜO
-LA ESTRARO POSTE DECIDOS ĈU ENKETI KAJ KIEL
-ĜIS LA JARKUNSIDO, LA ESTRARO LAŬEBLE ELLABORU NOVAJN PROPONOJN (POR 1992).

5. HONORIGO DE EDWARD SYMOENS.

Edward Symoens estis la unua elektita prezidanto de FEL de 1979 ĝis 1984 (kiam laŭstatute li devis anstataŭiĝi). Ĝis la jarkunsido de 1990, li tamen restis en la estraro kiel vic-prezidanto. Ni estas tre feliĉaj ke li akceptis nun la titolon de Honora Prezidanto.
Wim De Smet rakontis pri la konatiĝo kun Edward en 1975, pri lia iom post ioma (re)interesiĝo pri la Esperanto-movado, unue loke, poste nacie kaj interncie, kaj pri lia pionira rolo pro la okazigo de kolokvo pri "Estinteco, estanteco kaj estonteco de Esperanto en Flandrio" en Kalmthout.
Paul Peeraerts skizas la agrablan kunlaboron unue en la kadro de FEL sed eĉ pli intense en la kadro de ILEI kun homo, kiu havas tre klaran bildon pri la agado kaj koncize povas klarigi tion.
Maertens memorigas, ke li unue konitĝis kun la voĉo de Edward en NIR-radiokurso. Li ankaŭ memoras, ke Edward konvinkiĝis pri la valoro por agadi por Esperanto post la brila UK en Rejkjavik. Fine li emfazas la fidon, kiun Edward ĝuas en la internaciaj Esperanto-instancoj.
Ivo Durwael rimarkis, ke li dekomence admiris sed ankaŭ kritikis la agadlinion de Edward. La kritikoj forfalis kaj la admiro plie kreskis por 75-jarulo kiu ankoraŭ estas modelo en ĉiuj niveloj, kie li aktivas. Li trandonis nome de FEL la belegan libron HAFEZ.
En sia dankvorto, Edward demonstris la evoluon de la mentaleco per voĉlegado de tre romantiketosa alvoko por agadi por Esperanto, kiun li verkis antaŭ la 2a mondmilito, kaj kiu nun ridigas. Tamen ĝi ilustras ke Edward estas homo, kiu kredas ke la mensaj bezonoj estas multe pli gravaj ol la materiaj por la homa feliĉo kaj ĉiam konsekvence agadis.

6. NOVAJ PROPAGANDILOJ.

Peeraerts prezentas la plej novajn propagandilojn de FEL: la Esperanto-dokumento "Psycholigische reacties op het Esperanto", faldfolio, kiu altiras la atenton al la lingva problemo en la Eŭropa Komunumo, nova afiŝo dukolora, novaj skribiloj kun la vorto Esperanto. La grupoj povas mendi kvantojn kontraŭ la duono de la kostoprezo.

7. KARAVANO AL UK-BERGEN.

La edzo de Monda De Wolf pretas senpage ŝofiri buson al Bergen. Por 3-semajna vojaĝo + tranoktadoj + ĉiuj manĝoj (al Frederikshavn - DK, Oslo kaj Bergen kaj kelkaj ŝipekskursoj) oni taksas prezon de 50 000 ĝis 60 000 fr. La kunveno favore reagis al la propono. Nun oni ellaboros pli konkretan proponon kaj pere de revuoj kaj cirkuleroj komencos varbi kiel eble plej baldaŭ.

8. INSTRUADO EN FLANDRIO

Alex Humet denove enketis ĉe la grupoj pri la kursoj. La rezultoj estas tre similaj al la pasintjaraj. Detaloj aperos en alia loko. La ĉefaj konkludoj estas ke 2 trionoj de la kursanoj finas la kurson. Tiu rezulto estas ĝojiga. Sed el la kursfinintoj nur duono sekvas daŭrigan kurson. La sama nombro da homoj uzas la lingvon. Tio povus signifi, ke nur tiuj homoj, kiuj komencas uzi Esperanton ankaŭ pretas daŭrigi la kurson. Alex volas koncentri la atenton al la pligrandigo de tiu-ĉi grupo.

Laŭ peto de Raymond Wylleman, ni faris liston de la politikaj kontaktoj, kiuj fariĝis en Flandrio dum la lastaj jaroj. La listo estas kunmetita laŭ tio, kion la estraranoj de FEL rememoras. En ĝi povas do troviĝi eraroj kaj nekompletaĵoj. Ni kompreneble povas korekti ĝin. Por eviti misuzon, ni ne publikigis ĝin sed disdonas kopion nur al difinitaj personoj.

Jos Vande Bergh volas okupiĝi pri la evoluigo kaj pri la kontrolo de la sekvoj de tiuj elpaŝoj.

| Iniciantinto | Politikisto | Rezultoj |
|---|---|---|
| Durwael sisteme esploris la eblecojn pri novaj subvencioj | Rika De Backer (Eŭ) | -- |
| | Patrick De Wael (Kul) | -- |
| | Daniel Coens (Ins) | -- |
| | Min. Eksterl. Aferoj | -- |
| | Dir. Prov. Kulturservo | Prov. Subvencio de FEL iom post iom kreskis de 5000 al 50 000 |
| Maertens | Daniel Coens | Teksto por "Mededelingen blad", kiu ne aperis |
| Symoens | Cas Goossens | promeso pri scienca radioprogramo en 87 |
| Wylleman | Gratulon al novaj Eŭropaj parlamentanoj | ? |
| Vande Bergh | ataŝeo Patrick De Wael | promeso subv. vojaĝo al UK<br>promeso subv. Intern. Vesp.<br>promeso subv. traduko verko el Flandra lit. |
| Peeraerts/Durwael | Van Walleghem (Min. Kulturo/Subvenc) | pli altaj subvencio ekde 1991 |
| Caestecker/Lödör | guberniestro/Or. Fl. | sugestoj por tezoj pri E' al siaj studentoj |
| | skabeno kult./Gent | aĉeto de libroj/bibl. |
| Vande Bergh | skabeno kult./Houthalen | " " " " |
| | Genk | " " " " |
| | Beringen | " " " " |
| Van de Kieboom | ataŝeo Gaston Geens | ? |

Alex atentigas pri la sukcesa kampanjo en Antwerpen, "Horizon-taal" por varbi studentoj por mallonga kurso. Venontjare espereble ĝi povos okazi en pluraj lokoj samtempe.
Alex proponas la kreon de "artikolbanko", t.e. la kolekto de bonaj artikoloj, kiuj konvenas por uzo en kurso por progresantoj.
Alex informas pri la ekzisto de nederlandlingva vortaro por uzo kun la libro "Gerda malaperis" kaj invitas al partopreno en studotago por instruantoj en februaro.

----------------

Forgesitaj en la tagordo estas jenaj informoj:

9. TANTIEMO POR KLUBOJ

FEL pretas kompensi klubojn, kiuj alportas novajn klientojn por grafikaj laboroj.

10. ENKASIGO DE KOTIZOJ

Nia centro dissendos aliĝilon kun EP de nov.dec. Tiuj, kiuj ne pagis ricevos memorilgilon en januaro en EP. Kiu denove ne aliĝis ricevos personan leteron en marto. Gerd Jacques informos la grupojn pri la ĝusta dato de forsendo por eviti ke personoj, kiuj jam pagis tamen ricevas memorigilon aŭ leteron.

Protokolis: Ivo Durwael.